

## & En sonĝo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Marie Hankel (1907; Sableroj, Leipzig 1911). Baladigis Martin Strid (2017) per feroaj melodio kaj rekantaĵo tradukita de Jalgrima balado.>

### (#Melodio:

<1,6:29> (

/La Tiidodo TiiLaLa LaaMi;Mi LaaLaLa Tiidodo TiiLa;La dore mi faamimi miimi;mi reedodo miimimi miLa;

(#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La a)

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 En sonĝo mi bone parolas ; La lingvon sen ia eraro, ; Dirante mi, kion deziras, ; Kaj ĉiam sen help' de vortaro.

(×:; **Tondru danco tre ĉarme ; nun tretu fiere ĉiuj en la ĉen' ; staras jen mastrino.**)

'2 Facile la vortoj alvenas, ; La frazojn mi formas fluante, ; Neniame pri "sia" mi penas, ; Mi ĉiam komprenas "aŭdante". .....

'3 Malbona la akuzativo ; En sonĝo neniel ekzistas, ; Ho, bela en sonĝo la vivo ; El pura korgojo konsistas. ....

'4 En sonĝo... ho ne, mi ne dormas: ; Mi vidas la helan matenon, ; Kaj tamen la vortojn mi trovas, - ; Nun fine, mi rompis katenon! .....

'5 Mi nun efektive parolas, ; Kaj jen babiladas fluege, ; Dirante mi, kion deziras, ; Mi estras la lingvon ĝojege! .....